

ESPERANTISTA

REVUO POR ESPERANTO EN ĈEĤOSLOVAKIO

Eldonas Esperanto-Asocio en ĈSR, Praha II, Malá Štěpánská 7. – Redaktas Dr. Stan. Kamarýt

KONČÍME

Možnost zneužití našich esperantských tiskovin zahraniční nepřátelskou propagandou přivodila, že čs. esperantisté nebudou mít svůj tisk. Zánik „Esperantisty“ a j. esper. časopisů u nás nutí nás k pohledu zpět, abychom krátce zhodnotili, jak jsme naším esper. tiskem pracovali proti válce, pro mír a pro ty nové tužby, jež vytryskly z Velké říjnové socialistické revoluce v Rusku r. 1917.

Hodnotíme-li práci esper. tisku u nás v tomto směru, můžeme říci, že jsme pracovali dobře, i když jsme mohli pracovat ještě lépe.

Podařilo se nám esper. tiskem, zvláště po únoru 1948, kdy nepřátelský zahraniční tisk a rozhlas spustil kampaň pomlouvání poměrů u nás, paralysovat tyto pomluvy alespoň u čtenářů našich esper. tiskovin. Pomocí našeho esperantského tisku a rozhlasu bylo navázáno spojení s pokrokovými složkami v kapitalistických zemích a ony to byly, jež vyslovovaly obdiv a uznání velkolepému úsilí našeho lidu při budování socialismu v naší vlasti. Tak jsme získali stovky věrných přátel naší lidové demokratické republiky. Mezi těmito přáteli je i rodina Staverenova z Haagu, jejichž syn Petr byl holandskou justicí odsouzen na 7 let káznice, protože odepřel bojovat proti lidu Indonesie. Mohli bychom tu vyjmenovat celou řadu těch bojovníků za mír v kapitalistických státech, kteří vždy nedočkavě očekávali naše esper. tiskoviny, neboť z nich čerpali cenné zprávy pro boj za mír, čerpali z nich posilu. To jsou kladné stránky naší práce esper. tiskem. K těm patří také přátelské styky s esperantisty lidové Číny, kteří nás svým esper. tiskem učili poznávat novou Čínu, život čínského lidu dříve a nyní.

Těm esperantistům, kteří nás podporovali v naší propagační práci tiskem vyslovují dík za věrné služby našemu pracujícímu lidu, lidově demokratické republiky. Děkuji také těm různým činitelům, kteří nás podporovali při vstupu do naší propagační práce, do boje za mír, za socialismus. Bez jejich pomoci bychom sotva mohli rozvinout naši propagační práci tak, jak se nám, ji podařilo rozvinout.

Okolnost, že již nebudeme mít vlastní tisk jen dokresluje tu skutečnost, že boj za sblížení národů, za světový mír, dostoupil vyššího stupně — masového, na který už naše drobná práce nestačí.

Nemusíme tedy klonit hlavy, nýbrž naopak být si vědomi, že svůj úkol pokrokových esperantistů v boji za mír jsme splnili dobře. Můžeme to směle srovnat se službou vojína, který po vykonání svých vojenských povinností se zase vrací ke své denní práci na budování socialismu. I my jsme své úkoly splnili a své síly budeme věnovat lidu na jiném poli působnosti. A této nové práci, v masových organizacích, zvláště na poli utužování přátelství se Sovětským svazem, přejí všem bývalým čtenářům esper. tisku u nás mnoho zdaru.

A. Malík

Koloman Kalocsay:

VILAĜIRADO

II. (La lastaj strofoj el sume 8)

Kaj tiel de vizito al vizito
ŝanĝiĝas la malfido kaj la spito
je amikeco kaj je amo.

Iudimanĉe la vizit' forrestas.

Tuj ekscitite la vilaĝ' protestas
per urĝe plenda telegramo.

Por granda bat' al loka reakcio
estiĝas fine la traktor-stacio
gapata mire, kun respekto,
eĉ kiel realiĝon de miraĝo
en iu tago festas la vilaĝo
la enkondukon de elektro.

Vespere en la nova vilaĝklubo
programas la uzina kultur-grupo
kaj faras grandan sensacion.
Ĉeestas eĉ la menciita avino
taj ridas, larmas, provas eĉ je fino
kunkanti la Internacion.

Kalocsay Kalman:

DO VSI PŘIŠLA BRIGÁDA

II. (Poslední strofy z celkových osmi.)

A tak se od návštěvy po návštěvu
z té počáteční nepřízně a hněvu
již stává láska, která nezná klam.
Pak jednou brigáda se nedostaví.

Tu ves je plna rozruchu a vřavy,
a do města hned letí telegram.

Vtom pro reakci místní hrozná rána:
je traktorová stanice sem dána —
co zvlounů si jde ji obhlédnout!
A jako vzdušný přelud kdyby to byl,
tak na domácí lidi zapůsobil
k nim zaváděný elektrický proud.

A soubor závodní ten večer slaví
svým představením, k němuž veské davy
v Dům osvěty se hrnou do sálu.
I známá stařenka je na zápraží
a jásá, slzí — dokonce se snaží
pět s davem Internacionálu.

Přeložil Miloš Lukáš.

SKIZO PRI LA ĈEĤA MOVADO

Post la unua mondmilito la ambaŭ antaŭmilitaj esp. centroj Bohema Unio Esperantista kaj Bohema Asocio Esperantista kunfandiĝis en Ĉeĥoslovakian Asocion Esperantistan, la 1. II. 1920. Unua prezidanto estis Josef Eiselt, ĝenerala sekretario Rudolf Hromada. En 1930 estis elektita prezidanto Kamarýt, en 1939 Friedrich, en 1946 Malik, en 1948 ĝen. sekr. Mafik.

La gazeto de Kühnl „Časopis českých esperantistů“ aperadis ĝis eksplodo de la milito. En jan. 1918 fondis esperantistoj en Plzeň novan gazeton „La Progreso“, redaktatan de B. Titl. En 1921 komencis komercisto O. Adámek en Praha eldonadi monatan gazeton en ĵurnala formato „Čeĥoslovaka Gazeto“ kun paĝo „Nova Eŭropo“, redaktatan de H. K. Bouška. La gazeto volis esti tribuno de malgrandaj nacioj. Aperis ĝis komenco de 1923 sume 14 numeroj. En sept. 1920 komencis Julie Šupichová eldonadi propagandan gazeton Esperanĝský zpravodaj; ĝi aperadis regule tri jarojn ĝis decembro 1923. Ĉiuj tri organoj servis al publikigo de sciigoj de ĈAE, sed ne estis kun ĝi en organiza rilato.

„La Progreso“ baldaŭ suferis pro nesufiĉa nombro de abonantoj, ĝia sidejo ekster la ĉefurbo estis grava malhelpo malgraŭ ofero de Plzeňaj samideanoj precipe de Fr. Kavan. De la sesa jarkolekto aperis sole 6 numeroj kaj en 1923 transprenis ĝian eldonadon Rudolf Hromada. „La Progreso“ fariĝis oficiala organo de ĈAE. Hromada donis al ĝi belan tipografian aspekton kaj redaktis ĝin kun granda inteligenteco. Ĝi multon helpis al disvolvo de la Asocia agado, al kiu ĝi dediĉis multan penon kaj klopodon.

La organiza tasko estis malfacila. Inter esperantistoj troviĝis pluraj unuopuloj, kiuj pretendis esti propagandantoj en sia persona sfero; ili preferis ne sole ne aboni „La Progreson“ sed eĉ ne pli ĝin kaj tamen turni ĝin al diversaj aŭtoritatoj kaj instancoj kun proponoj kaj petoj neniel argumentitaj. Ĉiu krono postulata por organizita propaganda laboro ŝajnis al ili troa. Sed pli: ili eĉ laŭte fieris pro sia nekunlaboremo. Tial la kresko de la membronombro estis tre malrapida. Tamen kelkaj el la gvidaj personoj sukcesis kolekti tiom da rimedoj financaj kaj tiom da laborkapablo, ke la akiritaj rezultoj tre superis la eblecojn donitajn per membronombro kaj per sumo de kolektitaj kotizoj. Krom la jam nomitaj ni enskribu tie ĉi ankoraŭ nomojn de Ota Ginz, Frant. Slavík, Oto Sklenčka. Grava malfacilaĵo estis, ke la germanaj esperantistoj rifuzadis labori en komuna centro kaj fondis apartan „Germanan Esperanto-Ligon en Ĉeĥoslovakio“. En j. 1933 ni komencis denove trakti kun GEL, sed nur en 1936 estis starigita „Esperanto-Asocio en ĈSR“ donanta al la nacioj de tiama Respubliko en laŭlingvaj sekcioj kompletan aŭtonomion. Sed el germanaj esperantistoj aliĝis sole malmultaj, la plej larĝgvidaj, el kiuj du akceptis funkciojn en la Centra Komitato. La granda plimulto de germanoj restis en GEL.

„La Progreso“ suferis pro nesufiĉa nombro de abonantoj. Klopodo ricevi financon subtenon de lokaj grupoj kaj de unuopuloj havis tre nekontentigan resonon. Tial La Progreso devis aperadi neregule, kio kaŭzis iam tre akrajn kritikojn. En Prostějov komencis aperadi en 1930 monata organo „Ligilo“, la unuajn du jarojn ciklostilita, la trian presita. „La Progreso“ ĉesis eliradi 24. I. 1935. Kiam konstituiĝis EACSR, la eldonantoj de „Ligilo“ vendis la gazeton al la Asocio, kiu la 1-an de januaro 1938 eldonis la unuan numeron de la IX-a jarkolekto kiel sian posedadon. Tio signifis finan paŝon al organiza ordo. La 25. XI. 1939 aperis lasta numero de la Ligilo. La Asocio estis malpermesita de la Gestapo. „Ligilon“ redaktis Heikenwälder.

Kiam ni en liberigita respubliko renovigis la Asocion, ni starigis la kotizon tiel, ke ĉiu membro ricevu la aso-

cian organon. Tio aperis tre utila por la organizoj kaj por la membroj same. En 1949 ni havis 3968 membrojn.

La Asocio komencis tuj en 1920 sian agadon per eldonado de varba, informa kaj studa materialo. Aperis krom aliaj presajoj grandkvante „Esperanto — lingva ligilo“ kaj „Konciza enkonduko en Esperanton“ de Bouška. Aperis ĉeĥaj broŝuroj „Ligo de nacioj kaj E.“ kaj „E. kaj ĝiaj kritikantoj“ de Collinson. La lernolibroj estis eldonataj de komercaj eldonejoj, por kiu la Asocio kreis aĉetantan publikon. Estis eldonitaj lernolibroj de Julie Šupichová (pluraj eldonoj en diversaj redaktoj) kaj ŝia ampleksa legolibro „Legu kaj parolu“, de Ant. Šilha, de Žďárský-Procházka (tre detala), de Eiselt, de Bouška, de Kilian (6 eldonoj), vortaroj de Čánský-Riedl, de Filip, Hromada-Petr, de Berger. La ĉeĥa-esp. vortaro de Kühnl-Procházka el 1914 estis vendata ĝis 1938. Tial nur en 1949 povis aperi ĉeĥa-esp. vortaroj de Hromada (188 p.) kaj de Filip (654 p.). Filip-vortaro esp.-ĉeĥa (446 p.) aperis en 1947.

Lerneja ministerio per dekreto el 27. III. 1921 n-ro 5545 permesis instrui Esperanton kiel laŭvolan fakon en gimnazioj kaj liceoj. En „Provizora instruplano por komercaj akademioj“ (ministra dekreto el 7. V. 1921 n-ro 34 000) estis Esperanto inter pluraj laŭvolaj fakoj. Tiu ĉi instruplano validis ĝis 1931, kiam en la definitiva instruplano estis Esperanto ellasita. En oficiala gvidilo de instruistoj por civitana eduko estis Esperanto kaj E-movado donitaj kiel ekzemploj por montri aplikon de internacia solidareco kaj kunlaborado (min. dekreto el 11. IV. 1923 n-ro 44 457). Ĉe la ĉeĥa teknika altlernejo en Praha estis en 1922 starigita lektorato de Esperanto, kiu daŭras ĝis nun (lektoro Dr Pitlík). Ĉe 5 ekzamenaj komisionoj ĉe instruistaj institutoj estis starigitaj ekzamenantoj por Esperanto kiel laŭvola fako en urbanaj lernejoj. La eblecoj donitaj per tiuj ĉi dekretoj estis uzataj de esperantistoj ne sufiĉe vigle. Oni instruis laŭ ili dum pluraj jaroj en 2—10 lernejoj. Post j. 1930 la ministerio donadis permesojn instrui jam tre malvolonte. La ekzamenaj komisarioj ĉesis funkcii en 1936, kiam la komisionoj estis nove organizitaj.

Ĉs. Radio elsendis unuan prelegon esperantlingvan jam en 1923 (Dr Pitlík), kiun sekvis sume 4 kursoj (Bratislava, Brno 2, Praha) kaj diversaj neregulaj prelegoj kaj programoj. En 1932 komencis stacio Brno disaŭdigadi pli ofte kaj pli regule kaj rezultis regulaj Esperanto-horetoj prezentataj ĉiumonate per grupo de profesiaj aktoroj „Teatro-kaj Radio-Aktoroj (TRAKT)“ fondita en 1933 (Verda Stacio). La membroj lernis Esperanton en kurso aranĝita de Radiojournal Brno en aŭtuno 1933. Estis dissendataj artoprogramoj unuhoraj kun deklamoj, tetraĵoj, operoj, operetoj kaj muziko. La elsendoj estis tre altnivelaj pro aktorado de eminentaj artistoj, kiuj preskaŭ ĉiuj famiĝis sur ĉeĥaj scenejoj. La grupon fondis J. V. Šamla kaj Josef Bezdíček. El ceteraj stacioj plej ofte disaŭdigadis prelegojn Ostrava.

Kunlaborado de ĉs. movado kun movado internacia estis ĉiam tre vigla kaj intima. Kiam estis laŭ Helsinkikontrakto kreita Internacia Centra Komitato, estis nia ĝen. sekretario (Hromada) unu inter la 6 gvidaj personoj de la movado internacia. Ĉefdelegito de UEA por ĈSR Oto Sklenčka faris el sia teritorio teritorion modelan.

En Praha okazis en 1921 la 13-a universala kongreso (2561 p. el 35 landoj, ĝen. sekretario Dr Aug. Pitlík). Ĉeĥaj esperantistoj ĉeestis ĉiujn universalajn kongresojn, ofte en impona nombro, al multaj el ili estis sendita reprezentanto de ĉs. registaro.

Ankaŭ en ĉiuj teknikaj konferencoj partoprenis ĉeĥaj esperantistoj. La deklaron de la instruista konferenco en Genevo en 1922 ni presigis ĉeĥe en 24 000 ekz. kaj aldonigis ĝin al pedagogiaj gazetoj ĉeĥaj. La kon-

ferenco "Paco per Lernejo", en kiu oni traktis en diversaj lingvoj sed kiel unusola traduklingvo servis Esperanto, okazis en Praha dum pasko 1927.

Al eldonado de esp. tradukoj el ĉeĥa literaturo dediĉis sin "Moraviaj Esperanto-Pioniroj" en Olomouc, kiuj eldonis sume 12 librojn kaj libretojn. Sume aperis 29 verkoj el la ĉeĥa literaturo libroforme. Inter ili la plej reprezenta estas Ĉeĥoslovaka Antologio eldonita de Literatura Mondo en Budapeŝt, libro kun 468 paĝoj, redaktita de Ginz kaj Kamarýt.

Post la liberigo en 1945 nia Asocio fariĝis unu el la plej grandnombraj.

De septembro 1945 dum kvin jaroj ĝis septembro 1950 estis dufoje tage disaŭdigataj per mallongaj ondoj esperant-lingve sciigoj pri politikaj, ekonomiaj kaj kulturaj okazintaĵoj en nia lando, ofte kun nia muziko. Neniame ĝis nun okazis tiom grandioza provo apliki Esperanton. Krome estis sur mezaj ondoj disaŭdigataj semajne aŭ monate artismaj programoj kun eminentaj profesiaj kantistoj kaj aktoroj. La resonado en fremdlando estis kontentiga, sed ni rajtis pro amplekso de la dissendoj atendi pli viglan eĥon. Ĉefaj parolistoj estis Malik, Hromada, Mařík, artismajn programojn gvidis Ant. Slanina.

Plua granda faro estas eldono de Esperanto-Servo fare de Instituto de Esperanto-Servo fondita de Adolf Malik ĉe la Asocio kun financa subteno de la Informministerio. Depost oktobro 1948 aperas folioj en granda formato sur bibliaj papero kun politikaj, ekonomiaj kaj kulturaj informoj el nia lando. La bulteno aperadis en 5000 ekz. Ĉefa prilingva kunlaboranto de redaktoro Malik estis Miloš Lukáš. La tekstoj estis ofte malfacilaj por la traduko, temas ja ofte pri temoj tre subtilaj.

(Fino sur p. 139)

NI LEGIS

Eperantista Somero 1951 estas plua pruvo de vivanteco de nia movado. Krom la Universala kaj la SAT-kongresoj okazis dum tiu somero pluraj unu-aŭ dusemajnaj kunvenoj, kiuj ĉiuj havis krom refreŝigo kiel celon pliperfektigon en la lingvo. Ni provis fari koncizan raporton pri ĉiuj.

Do krom la someraj dusemajnaj kursaroj en nia lando en Rožnov p. R. (115 p.) kaj Doksy (165 p.) okazis:

Internacia Ferio-Semajno en Konstanz (Germanujo) la 28./7.—4./8., ĉirkaŭ 110 partoprenantoj el 14 landoj. Matene kutime okazis perfektiga kurso, tre bone vizitata, posttagmeze ekskursoj.

Internacia Pedagogia Seminario en Kochel am See (Bavario) 26./7.—4./8. por 21 geinstruistoj el Britujo, Francujo, Germanujo, Nederlando. Ili traktis precipe pri la temo "Esperanto ĉe la instruistaro kaj en la lernejo".

La 7-a Internacia Junularkunveno de la Tutmonda Junulara Asocio okazis la 26. VII.—2. VIII. en Haarlem (Nederlando). Kunvenis 280 partoprenantoj el 15 landoj. En la laborkunsido estis elektita nova estraro: prez. T. Kanter (Nederlando), sekretariino f-ino H. Veldhuyzen, kasisto G. de Vries.

Internaciaj Feriaj Kursoj en Helsingör (Danujo) la 21.—28. VII. 120 partoprenantoj el 11 landoj, konsistis el prepara kurso por Cseh-metodaj instruistoj gvidita de T. Morariu, kurso konversacia gvidita de s-ino Major, kurso daŭriga gvidita de f-ino Ida Christensen, kurso por infanoj gvidita de P. Jorgensen.

Internaciaj Someraj kursoj en Soesterberg (Nederlando) la 27. VII.—2. VIII., 90 partoprenantoj, nederlandanoj, 4 gefrancoj, 2 svedinoj, kaj s-ro O. S. Magnusson el Islando.

Internacia Studenta Tendaro Arkeologia sur insulo Bornholm por helpi sub scienca gvidado de dana arkeologo ĉe elfosado de domo el la ferepoko, okazis la 30. VI.—20. VII. ĉe urbeto Svanske. Ĉeestis 13 studentoj

universitataj, inter ili 7 virinoj, el Finnlando, Svedujo, Norvegujo, Nederlando, Germanujo, Danujo.

Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI) kunvenigis dum julio en Marktleuthen (Germanujo) 100 siajn membrojn el 6 landoj por pasigi semajnon en kristana frateco. Gastigis pastoro Hoppe.

Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE) organizis sian 23-an kongreson en kadro de la Universala Kongreso en Munkeno. Kunvenigis 160 aligintojn el 11 landoj. La dimanĉan diservon por katolikoj en la Ludwig-preĝejo ĉeestis ĉ. 1500 kongresanoj; predikis Pastro A. J. Beckers el Belgio. Oni legis salutleteron de kardinalo Th. Innitzer (Wien). Estis elektita prezidanto de IKUE A. J. Beckers.

En "La Revuo Orienta" komencis en la 7-a n-ro aperadi po partoj "Skizo de la historio de la moderna Ĉeĥa literaturo" verkita de D-ro Jan Ort, tradukita de Miloš Lukáš. La teksto origina estas same bona kiel la traduko.

El Popola Ĉinio, organo de niaj amikoj Ĉinaj, tre zorge redaktata, aperas regule ĉiumonate, kaj pligrandigis nun sian amplekson aperigante anstataŭ ok dek du paĝojn. Ni gratulas al nia kolego ankaŭ pro tiu ĉi sukceso eldona.

KRONIKO ENLANDA

Kunveno pro rememorigi 50 jarojn de la Esperantista Klubo en Brno la 17—18-an de novembro estas okazintaĵo, kiu superas intereson lokan tre alte. Temas ja pri klubo, kiu estis la unua en tiama Aŭstri-Hungaria monarkio kaj depost sia fondo funkcias seninterrompe ĝis nun. Ĉe ĝia lulilo staris tri viroj, ĉiu elstaranta figuro en sia agadosfero: Karel Pelant, tre talentita ĵurnalisto, protagonisto de la Libera Penso kaj de la kremacio, laborista gvidanto senatano Fr. Hybeš kaj J. Kajš tipografo kunlaboranta aktive en multaj sferoj de progresema strebado, la sola ankoraŭ vivanta el tiuj tri.

Kunvenis ĉirkaŭ 200 partoprenantoj, el ĉiuj partoj de la Respubliko, inter aliaj malnovaj batalantoj por nia afero ankaŭ maljuna pioniro de la movado aŭtoro kaj eldoninto de la unuaj lernolibroj kaj gazetoj Th. R. Ĉejka.

Sabaton vespere okazis Amika vespero kun koncerto. Ĥoro de la Kluba Junularo kantis kantojn junularajn kaj popolajn (en tradukoj de Pumpr, Filip, Chlubnová), M. Adamcová legis ĉapitron el "Raportajo skribita en pendumila ŝnuro" tradukitan de Hromada. Eva Suchardová deklamis sian poemon "Letero el malsanulejo" kaj tiun de Fr. Šrámek "En pluva tago aŭtuna" tradukitan de Hromada. L. Kovář legis duan kanton el Bapto de Sankta Vladimiro tradukitan de Kamarýt. St. Frölich poemon de Mickiewicz "Vojevodo" tradukitan de Grabowski.

Trio el la Junularo legis Morton de Arĥimedo el Apokrifoj de K. Čapek tradukitan de Vondroušek. S-ino O. Orlová kantis Rusajn popolajn kantojn, Frant. Crha kantis Poem de Fibich en traduko de Hromada kaj "Kantas mi al mia lando" de Petzný kaj "Gardo ĉe Volgo" de Lehár, ambaŭ tradukitajn de Kořínek. Míla Režná kantis arion de Najado en traduko de Pumpr kaj kune kun Fr. Crha duteton "Amo, juna amo" en Pumpr-traduko.

Solena kunveno dimanĉon komenciĝis je la 10,15 h. per kanto de la himno. Poste prezidanto de la Klubo Josef Vondroušek prezentis historion de la Klubo skizante periodojn de ĝia aktiveco kaj interrompoj de la kluba vivo pro la du militoj. Lia prelego estis edifanta pro la kolektita materialo kaj pro la prezento same. Poste alparolis la kunvenon Th. R. Ĉejka rakontante pri komencoj de sia agado. Th. Kilian legis lian artikolon pri kunlaborado kun Krumpholz. Poste parolis mallonge Dr. Stan. Kamarýt pri signifo de

kontinueco en nia movado, kaj pri meritoj, klujn akiris prezidanto Vondroušek pro sia persistemo, Rudolf Hromada pri la plej signifaj akiraĵoj dum la kvindek jaroj, Dr Aug. Pitlík pri komencoj de la movado antaŭ kvindek jaroj, Jar. Šustr en nomo de E. K. en Praha, kiu festos la saman datrevenon post unu jaro, V. Špür en nomo de Kolegio en Doksy, D. Chlubnová dankis al prezidanto Vondroušek pro lia sindediĉo al klubaj laboroj dum longa vico de jaroj. Du delegitoj el Olomouc alportis al li bildon kiel donacon de la tiea klubo.

Sekvis altnivela koncerto de profesiaj artistoj. Profesoro Vilibald Scheiber kaj Alena Horáková prezentis piane kvarmane Marŝon el la simfonia poemo Volha de Scheiber, La fidemon kaj La Ringon el Moraviaj duetoj de Dvořák kaj Slavan dancon n-ro 1 de Dvořák. Věra Borská kantis arion de Roza el "Sekreto", "Ho diru" de Mozart, "Nova ĝojo, nova timo" el "La edziĝo de Figaro" kaj "Knabino, mia roza flor" de Fibich opuso 12. Václav Kvarda kantis arion de Přemysl "Ho tiloj" el „Libuše“ kaj "Sub arbust" de rozo kampa" de Vítězslav Novák. Eva Suchardová deklamis poemon de Viktor Dyk: Patrujo parolas kaj Romanco pri Karolo la IV-a de Jan Neruda. La tradukoj de la kantoj estis plejparte de Jiří Kořínek, de Hromada, kaj de Pumpr. La poemo de Neruda estas tradukita de Lukáš, tiu de Dyk kolektive de Kořínek, Pumpr, Hromada. D. Chlubnová deklamis poemon "Lenin" de Majakovskij. En ambaŭ koncertoj pian akompanis prof. Scheiber.

En la koncerto sabata rolis plejparte amatoroj, en tiu dimanca profesiaj artistoj. Ambaŭ havis tre altan nivelon. Tio estas sperto konata ĉe tiaspecaj entreprenoj en Brno. Prof. V. Scheiber piano-virtuozo, respondeca pro parto muzika, kaj Jiří Kořínek pro la esperantlingvaj tekstoj ricevu admiran gratulon. Kun Scheiber pianoludis nova samideanino Alena Horáková, profesorino en muzika lernejo; ŝi estu salutita pro sia arto kaj kiel nova rolantino en niaj programoj. Kaj la konataj kanto-majstroj Borská, Kvarda, Črha, Režná, Orlová akceptu nian dankon pro sia daŭra kunlaborado. Sed pro la jubilea karaktero de la entrepreno ni turnu nian atenton al la esperantlingvaj tekstoj de la du koncertoj. Ilia bona kvalito estas okulfrapa fenomeno, despli grava, ĉar temas pri tekstoj de kantoj kaj poemoj malfacile tradukeblaj. Kiam ni aŭdis tiom longan vicon de poeziaj tekstoj, ni ne povas ne emfazi iliajn elstarajn kvalitojn. Tiuj bonaj tekstoj evidente helpas ankaŭ al la deklamantoj kaj kantantoj. Multaj el la kantoj estis de Jiří Kořínek, nova adepto de nia lingvo kaj nova aŭtoro de kantotekstoj, kies kvalitoj daŭre kreskas. Sed ni enskribu tie ĉi aparte du programerojn: Longa ĉapitro el Fučík-raportajo legita de M. Adamcová katenis atenton dum la tuta prezento pro la traduklingvaĵo kaj pro la legado same. Kaj la glora Dyk-poemo "Patrujo parolas" deklamita de Eva Suchardová en traduko kolektive farita de Kořínek, Pumpr, Hromada estis sperto ekster serio. La poemo de Dyk konsistas el koncizaj parolturnoj kaj nekutimaj rimoj kaj efikas konsternante ofte pro la nura ritmo. La tradukintoj sukcesis mirinde imiti la stilon kaj la deklamantino prezentis la poemon kun neordinara efiko.

Konferenco de regionaj perantoj kaj ceteraj funkculoj de la movado en Praha la 2-an de decembro kunvenigis 110 partoprenantojn el ĉiuj regionoj de la lando. Gvidis la kunvenon vicprez. R. Hromada. La kunveno estis informita pri ĉeso de nia organo kaj pri adaptiĝo de nia organizo al novaj normoj pri libervolaj kulturaj organizaĵoj. Estis elektita komisiono, kiu traktos kun oficialaj instancoj kaj informos taŭgatempe niajn membrojn pri nova formo de nia laborebleco. La funkcioj de E-rondentoj en Kulturkluboj de la Revolucia Sindikata Movado (ROH) raportis pri multaj tre bonaj spertoj en la Sindikataj organizaĵoj.

Esperanto-Angulon havas sindikata monata gazeto fervojista de regiono Hradec Králové Hradecký železničář. La unua aperis en numero septembra.

Jaroslav Šustr kvindek-jara. La prezidanto de nia plej granda loka grupo Esperantista Klubo en Praha, naskiĝis la 6-an de decembro 1901. Prezidanto de la Klubo li estas seninterrompe de post 1927 kaj estas precipe lia merito, ke la Klubo travivas sukcese tajdojn de entuziasma atako al la publika opinio kaj retiriĝo por interna laboro. Eĝas ankaŭ lia merito, ke la Klubo ne ĉesis funkcii eĉ dum la germana okupacio. Eĉ dum tiuj mallumaj jaroj flagris flameto de esperantista fido al homa intelekto kaj pensokapablo. Estas ankaŭ precipe lia merito, ke la Kluba biblioteko estis konservita. Li ja sciis ofere transportigi ĝin en kelon, kiam la klubejo estis nuligita ĉe adapto de la kafejo Louvre al komercaj oficejoj, kaj fine transportigi ĝin en ĉambron de la Asocia oficejo. Sed por la Klubo li ne estis nur administranto. Li estis idea gvidanto laŭ diversaj vidmanieroj, kaj li sukcesis, ke la semajnaj klubaj kunvenoj estis dediĉitaj al programoj ofte tre allogaj kaj instruaj. Li prave fieras, ke la Klubo antaŭ la dua mondmilito fariĝis speco de internacia esperantista salono. Da vizitoj de fremdlandaj esperantistoj en ĝiaj kunvenoj dum kelkaj jaroj estis ne dekoj sed centoj. Kaj ni ne forgesu rimarkigi, ke lia butiketo en Dlouhá tř. estis dum longa vico de jaroj kvazaŭ centra kunveno de esperantistoj el la ĉefurbo, el la provinco kaj el la fremdlando. Ĝiu veninto ricevis afablan informon; ofte ĝi signifis kuraĝigon; iam eĉ helpo materialan al vojaĝanta samideano en embaraso. Ankaŭ tie, ne sole en la klubejo kaj en kluba administrato, helpadis al li lia edzino, kiun ĉiuj esperantistoj konas kaj alte estimas.

Agado de Šustr ne estis limigita unusole al sfero de lia klubo. Li estis ofte funkciulo de Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista, en 1932—33 ĝia ĝenerala sekretario, delegito de UEA, komerca reprezentanto de Heroldo de E. kaj en aliaj funkcioj. Ĉar du trajtoj en lia karaktero estas la plej elstaraj: aktiveco kaj studemo. Tiaj kvalitoj daŭre instigas al akcepto de taskoj, iam ne tro facilaj kaj ĉiam lacigaj. Sed la dua flanko de laceco estas ĝojo pro farita servo. Samideano Šustr ofte ĝuu tiun ĉi ĝojon en plena sano kaj kontenteco!



Jaroslav Šustr kvindek-jara.



Oto Sklenčka sesdek-jara.

Tiu ĉi numero de nia revuo estas la lasta. La informministerio reorganizis planon de eldonado de gazetoj. Pluraj estis ĉesigitaj kaj anstataŭitaj per aliaj, por ke ankaŭ en eldonado de monataj gazetoj envenu nova plano. Inter la ĉesigitaj estas ankaŭ nia gazeto.

Ni uzas la okazon por danki al niaj legantoj enlandaj kaj eksterlandaj pro atenta sekvido de nia revuo, al niaj kunlaborantoj pro ilia kontribuado kaj al niaj membroj pro ilia fideleco kaj aktiveco.

Nia Asocio ne ĉesos sian ekzistadon. Ni esperas, ke ni povos kontakti kun nia membraro per ciklostilitaj cirkuleroj. Krome ni klopodos ricevi permeson, ke eksterlandaj gazetoj esperantistaj povu veni en nian landon en pli granda nombro. Ankaŭ pri ebleco ricevi el fremdlando esperantajn librojn ni denove klopodos.

Ni traktas pri eniĝo de nia Asocio en iun amasorganizon.

Granda parto de niaj lokaj grupoj eniĝis jam en kulturklubojn de Revolucia Sindikata Movado ROH. Vidu pri tio liston sur paĝo 136.

Estas intenco en Informministerio krei por similaj societoj kiel nia apartan centron. Pri tio ni informos esperantistojn taŭgatempe. Fine estos informita nia regula jarkongreso, kiun ni esperas kunveni dum marto en Praha.

Daniel Quarello:

I. Lerne Esperanton!

II. Komplementoj de l'substantivo.

III. Komplementoj de l'verbo.

Tiuj ĉi studlibroj por progresintaj esperantistoj estas nun riceveblaj de nia librovendejo volumeto po 15,80 Kčs afrankite.

NIA GAZETO, NICE. Ni serĉas la nrojn 1—4, 6, 8, 18, 19, 30—33, 37. Ni donos interŝanĝe aliajn malnovajn gazetajn numerojn aŭ samvalorajn librojn. Skribu al EAĈSR, Centra biblioteko.

Esperanton oni ne forgesas /

Pro obhaceni programu v klubech obstaráme přednašeče se serií přednášek v esperantském nebo českém jazyce „Léčivé rostliny“, s krásnými světelnými obrazy za velmi výhodných podmínek. Podrobné informace podá kanclář Svazu.

LOKAJ INFORMOJ

Brno. — Kurson por lo komencantoj gvidas de oktobro J. Friedrich. — O. Schwetter (Břeclav) instruas en la pedagogia altlernejo 27 studentojn, kiujn li varbis per sia prelego pri Esp. korespondado kun japano.

Brno-Židenice. — De oktobro kurson por 8 komencantoj gvidas Kaplerová kaj Zelníček.

Břeclav. — Esp. rondeton ĉe industria lernejo partoprenas 20 anoj. Gvidas Ing. Coufal, instruas Vítovský.

Gottwaldov-Otrokovice. — Du kursoj komenculaj estis malfermitaj la 9-an de oktobro por 52 partoprenantoj.

Cheb. — Nia loka grupo decidis en sia jarkuveno la 11. X. likvidiĝi kaj eniĝi en Kulturano Klubon ROH de Stavomat, distrikta komunuma entrepreno (en Cheb, Stalingradská 10). En ĝia komitato la E-rondeto estas reprezentita de samideanoj Frant. Vrchota kaj Karel Bělohradský (Provaznická 20).

Karlovy Vary. — Kurso por 10 p. komenciĝis en oktobro, instruas ĉiumarde s-oj David kaj Tichota alterne, en Kultura Klubo de ČSD (ROH) str. Varšavská 5.

Kroměříž. — Kurso komencula estis malfermita la 19-an de oktobro en kadro de Kleriga Kunularo (osvetová beseda) por 12 mezlernejanoj kaj 10 gimnazianoj laŭ la Krajic-lernotekstoj. Samtempe estis fondita E-rondeto ankaŭ en la kadro de la Kleriga Kunularo. Propagando por partopreno en la kurso kaj rondeto estis farita per afiŝo en montrofenestro kaj en gimnaziana buĥteno. Helpis en la propagando precipe Foltýn kaj Vašiček, la aferojn gvidas Jaroslav Suchánek (Stát. žakovský internát).

Lanškroun. — En oktobro komenciĝis kursoj: 1. Komencula por gimnazianoj, instruas Luboš Kretschmar 18 p. — 2. Komencula por internato Tesla, instruas Jenda Werner 18 p. — 3. Komencula por lerneja junularo, instruas Zdeněk Polák 18 p. — 4. Komencula por plenkreskuloj, instruas Jaroslav Píček 14 p. — 5. Progresinta, gvidas Jožka Cink.

Praha. — Dum la aŭtuna sezono Esperantista klubo en Praha en la kadro, de ONV 2, kleriga departemento iniciatis kaj aranĝis poresperantan kaj porkursan kampanjon per afiŝoj kaj flugfolioj. Krom 30.000 flugfolioj, aldonitaj al la mangokuponaroj en distrikto Praha 2, mil trikoloraj afiŝoj estis fiksitaj sur la strataj porafiŝaj tabuloj tra tuta Praha. — La 2an de oktobro estis malfermitaj 3 Esperanto-kursoj, por komencantoj laŭ la Ce-metodo, por mezprogresintaj kaj por plej progresintaj — ambaŭ lastaj laŭ nereakta metodo. Dum kelkaj tagoj post la komenco, la komencula kurso tiom pleniĝis, ke devis esti malfermita la kvara. Entute 140 lernantoj. Instruas J. Bendová, J. Vitek, A. Slanina. Dum la oficiala malfermo de la kursaro parolis, inter aliaj, reprezentanto de la lerneja departemento de ONV 2 (distrikta nacia komitato), k-do Cikhart, kiu en sia parolado montriĝis iama entuziasma esperantisto, utiliganta Esperanton en sia profesio por interŝanĝado de literaturaĵoj kaj studmaterialo. — La 6an de oktobro estis malfermita Esperanta seminario, en kiu prelegis entute 14 oratoroj en 10 sabataj vesperoj de la 6a de oktobro ĝis la 8a de decembro. En ĉiu vespero okazis 2 prelegoj esperantlingvaj; la unua instrua, priesperanta, la dua peresperanta. pri aktualaj sociologiaj kaj populare sciencaj temoj. La unuopaj prelegoj estis resume valortaksataj fare de la seminaria gvidanto kaj sekvis vigla diskuto de la aŭskultantaro al la temo. Ĝiun sekvantan dimanĉan matenon la frekventantaro de la Seminario partoprenis al komunaj ekskursoj tra antikva Praha kaj al la vidindaĵoj de la urbo. Esperantlingve akompanis prezidanto de E. K. P. J. Sustr. Al la Seminario aliĝis 37 personoj, krom kiuj vizitadis ĝin ankaŭ 16 gastoj.

Inter la partoprenantoj estis entute 11 eksterprahanoj. Al ili estis prizorgita 50 %a fervojrabato.

La 1-an de decembro E. K. P. okazigis prelegvesperon en la Zengeraŭditorio de la Ĉeĥa Teknika Altlernejo en Praha en la kadro de la Seminario. Prelegis s-anoj RNDr Miroslav Pulchart — Atomenergio dum paco kaj en milito, Rudolf Hromada — Ĉeĥoslovaka Esperantomovado. La Seminarion gvidis s-ano T. Balda.

ONV - Praha 2 kaj Distrikta Aga Komitato de l'Nacia Fronto en Praha sendis esperantlingvan gratuleteron al la registaro de Ĉina Popola Respubliko okaze de la dujara datreveno de l'fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, iniciatis kaj peris sekretario de E. K. P. (T. Balda).

Strakonice. — Prelego kun lumbildoj de Josef Vitek, instruisto el Praha, pri Laplando (ĉeĥlingva) la 24. XI. tre sukcesis ĉe la publiko pro tre bela kaj interesa prezento. La preleganto emfazis utilecon de Esperanto por vojaĝanto. Nia loka grupo dankas al li elkore, ĉar li tre helpis en la laboro por Esperanto.

Třebíč. — E-junularo elektis kiel prezidanton Jaroslav Haveš, kiel delegiton Jaroslav Gottfried (Záměstí, Tiché nám. 8, Třebíč). La Junulara grupo havas 10 gvidantojn kaj sume 78 membrojn.

KORESPONDI DEZIRAS:

Por iniciati internacian korespondadon, intersanĝadon de spertoj kaj reciprokan informadon pri sociala medicino ni deziras ekligi kontaktojn kun

a) malsanuloj pro tuberkulozo (pulma, artika, alispeca), t. e. kun nuntempaj pacientoj en hospitaloj kaj sanatorioj kaj kun resaniĝintoj,

b) kuracistoj, terapistoj per X-radioj, ĥirurgoj, kuratoroj, flegistinoj, flegistoj, administraj laborantoj kaj aliaj aktivuloj en agado kontraŭ la tuberkulozo.

Ni respondos senprokraste kaj persone al ĉiu. Skribu al la Redakcio de STATUS, Social-Medicina Revuo, Kocksgatan 15, Stockholm 4, Svedlando.

S-ro Henry Atten, 81 Gladstone, Detroit 2, (Mich.) USA, kun ĉiuj landoj, interŝ. PM.

S-ro L. Gacquer, 57 Boulev. Thiers, Amiens (Somme) Francio, interŝ. PK, PM.

Studentoj de Okayama Universitato deziras intersanĝi desegnaĵojn kaj aliajn verkojn de infanoj. Skribu al: Esperanto-Bu, Okayama-Daigaku; Tusima, Okayama-Si. Japanio.

S-ro C. P. de Bruin, Preaugurstr. 35, Enschede, Nederlando, deziras ricevi malnovajn esperantaĵojn, kiujn li rekomencos per Plena Vortaro aŭ Leteroj de Zamenhof.

S-ro Adolf Jachek, Police nad Metují 221, kun ĉiuj landoj de la mondo.

S-ro Miloš Ther, Masarykovo nám. 78, Police nad Metují, kun ĉiuj landoj de la mondo.

S-ro Sven Ström, Noaksväg 5, Aelvsjö 4, Svedlando volas intersanĝi gramofonajn diskojn kun ĉeĥa junulo aŭ junulino. Atentu pri la necesa eksport-permeso!

S-ro Zdeněk Otakar Nový, muzikverkisto, Na Pankráci 56, Praha XIV, kun tuta mondo pri ĉiuj temoj.

S-ro Jaroslav Pokorný, Riegrova 299, Švermov I u Kladna, 18-jara Ĉeĥa studento, koresp. k. intŝ. pk, esp. glumarkojn k. gaz. kun eksterl. kaj. ĉs. gesamideanoj.

S-o Terumichi Takisawa, Aomori-ken, Togun, Singyo 131, Aino (Jap.), 11-jara studento, interŝ. poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn.

S-o Jasuo Hajaŝi, 2 Ohaŝi-Ĉo 8, Nagata P. O. Zono, Kobe-ŝi (Jap.), 17-jara studento, interŝ. il. poŝtkartojn kaj gazetojn.

S-o Lee Mjongu, 349 Kamibeppo Oocu, Sigaken (Jap.), 18-jara studento, Koreano, loĝanta en Japanio, intersanĝi il. poŝtkartojn kaj gazetojn.

S-o Tatunosuke Inaba, Kugo-Mati, Yokosuka (Jap.), 46-jara oficisto, per poŝtkartoj aŭ leteroj.

RICEVITAJ LIBROJ

Jarlibro de UEA. 1951. Dua parto. 48 paĝoj 12×15 cm. La broŝuro en konate bela tipografia aranĝo ne enhavas tiun ĉi jaron kompletigojn de la Delegitigoj-nomaro sed krom la administra kaj kasa raportoj enestas Resumoj de Raportoj de Landaj Asocioj kaj de Raportoj de la Fakaj Asocioj. Ni tre laŭdas reaperon de tiaj raportoj. Sed ankoraŭ pli interesa estas listo de lernejoj, en kiuj oni instruis Esperanton 1950—51. En 17 landoj oni instruis Esperanton en lernejoj al lernejoj kun permeso aŭ aprobo de lernejoj instancoj, en tre malgranda amplekso laŭ nombroj, sed nepre pli aŭ malpli oficiale. F-ino Violet C. Nixon (183, Woodlands Park Road, Bournville, Birmingham) meritas grandan dankon pro aranĝo de enketo, el kiu rezultis tiu listo. — Laŭ statistika tabelo primembra estas membroj en 74 landoj. Ĝi estas ankaŭ tre konvinka dokumento pri internacieco de nia movado.

Historio de Yukawa teorio. Esperanto-Rondo en Naturscienca Fakultato de Osaka Universitato. Osaka, Japanujo. — 26 paĝoj 13×18 cm. — D-ro H. Yukawa proponis en 1934 hipotezon, ke inter atom-eroj ekzistas krom protono, neutrono kaj elektrono plua ereto, nomiĝita mezono, ĉar estante proksimume 200 oble pli granda ol elektrono ĝi situas inter tiu ĉi kaj protono, kiu estas centoble pli granda. Tiun hipotezon konfirmis eksperimentaj observoj en 1937 kaj ideo de mezono fariĝis tre grava en la teoria fiziko. Yukawa ricevis en 1949 Nobel-premion. Disvolvono de lia teorio kaj ĝian aplikon priskribas studentoj de la Osaka-universitato laŭ verkaĵoj de Prof. Shoichi Sakata tre klare kaj interese. Iia kapablo klarigi problemojn de teoria fiziko estas tre rimarkinda, same ilia bona uzo de Esperanto. En la broŝuro enestas krome artikolo de D-ro Fujio Egami, profesoro de biologia kemio en Nagoya Universitato, „Scienco kaj Esperanto“, kiu finas per sekvanta alineo: „Mi proponas al sciencistoj-esperantistoj de la tuta mondo, ke ili publikigu ĉiujare almenaŭ unu el siaj publikaĵoj en Esperanto. Tiu movado certe akcelos la enkondukon de Esperanto kiel oficiala lingvo en internacian sciencujon.“

Fernando Nery: Rui Barbosa (1849—1923). Biografia eseo. El la portugala lingvo tradukis Jozefo Joels. Domo de Rui Barbosa 1949. (Aperis en 1951 ĉe Casa de Rui Barbosa, Rua São Clemente, 134 Rio de Janeiro, Brazilo). 294 paĝoj 15×23 cm. — Rui Barbosa estis eminenta brazila ŝtatisto, juristo, verkisto, brila stilisto, arda oratoro. Por honorigi centan datrevenon de lia naskiĝo estis tiu ĉi biografio eldonita en 1949 per oficiala institucio Barbosa-muzeo. Nun ĝi aperis en esperanta traduko en la sama eldonejo.

La aŭtoro de la verko estas evidente majstro. En la 32-paĝa „enkonduko“ li koncize kaj intue skizas karakteron de tiu ĉi viro nepre eksterordinara. La unuopaj alineoj de la enkonduko titolas: Multflanke fekunda vivo, La ĵurnalisto, La oratoro, La advokato, La politikisto, La studemulo, La beletristo, La kuraĝo de Rui Barbosa, Ĉu vantemulo? Nepruvita memkontraŭeco. Kaj pri ĉiu tia karakterfaceto scias la aŭtoro diri vortojn trudantaj al pensado. Sed li scias ankaŭ daŭre apogi sian priskribon sur citaĵoj de Barbosa mem aŭ de liaj amikoj kaj malamikoj. Tiel lia karakterizado fariĝas tre konvinka. Poste sekvas la biografio, tre riĉe kaj konvinke dokumentita per tekstoj el paroladoj, diskursoj, leteroj kaj verkoj de Barbosa aŭ de viroj rolintaj samtempe sur la politika kaj kultura scenejo de Brazilo. La legado de la verko multon instruas pri la politika, kultura kaj ekonomia evoluo de Brazilo. Barbosa ja dum sia longa vivo estis elstaranta figuro en la publika vivo de sia lando daŭre batalante por ĝia progreso kaj por ĝia evoluo al respublika ŝtatformo. Idealej de libereco kaj de justeco

havis en li advokaton. Ni diras tiun vorton en la plej bona senco ĝia. Barbosa ja estis ankaŭ scienculo pri juro kaj advokato por право.

La traduko de tiu ĉi libro meritas nepran laŭdon. La traduklingvaĵo estas legata tre flue, la leganto nenie stumblas pri maloftaj aŭ fuŝe kreitaj parolturnoj kaj kliŝoj. Ĝar la lingvaĵo de originalo estas ofte artisma, la traduka tasko ne estis facila. Krome la tradukanto devis ofte redoni terminojn tre specialajn al la lando. Ĝuste en sfero de politikista kaj ĵurnalista lingvaĵoj aperas kliŝoj idiotismaj kaj slangaj, kiujn redoni al internacia publiko estas tre malfacile. Sed en lingvaĵo de Joels ni preskaŭ ne renkontas iajn idiotismojn. Versimile li sukcesis tiom bone redoni la portugaliajn, ke ni ne rimarkas ilin.

Estu permesitaj sole tri rimarkoj pri la uzitaj kliŝoj: Por ŝtatestro respublika ni preferas **prezidento** anstataŭ prezidanto. Estas granda diferenco inter la prezidanto de Esperantista Asocio kaj estro de respubliko, ne sole en iliaj potencoj sed ankaŭ en iliaj funkcioj. Inter funkcioj de respublikestro prezidado neniel estas la ĉefa. En la latinidaj lingvoj inter la du "prezidantoj" oni distingas per sinsekvo de la vortoj, per kutimigintaj kliŝoj, per akcento. Tio en Esperanto estas neimitebla. Tial aparta radiko estas bezona. Uzis la vorton prezidento denove tradukintoj de la Ĉeĥoslovaka Konstitucio kaj Butler ekz. aprobis tion. — Por la plej alta tribunalo sufiĉas "**supera tribunalo**" kiel diras ekz. traduko de la Sovetia konstitucio por "Supera Soveto". Superega estas tro nekutima. Eble. — "**Polico faris abomenajn arbitrojn**". Mi tion bone komprenas, kvankam ŝajnas malofta uzo de arbitro en tiu ĉi senco. Al mi plaĉas tia uzo.

Ankaŭ la tipografia aranĝo de la libro estas tre riĉa. Enestas bildoj de Barbosa, laŭ fotografajoj kaj laŭ pentraĵoj, kiuj tre ornamas la libron kaj bone helpas al la leganto.

Ni gratulu al esperantistoj Brazilaj, ke ili sukcesis eldonigi libron tiom bonan kaj ni danku al oficialaj aŭtoritatoj en Brazilo pro ilia saĝa uzo de Esperanto.

Francisco Cândido Xavier: Antaŭ du mil jaroj.... Romano de Emmanuel. El la portugala lingvo tradukis L. C. Porto Carreiro Neto laŭ la 5-a eldono reviziita de la aŭtoro. Eldonfako de Brazila Spiritisma Federacio. Avenida Passos, 30. Rua Figueira de Melo, 410. Rio de Janeiro. Brazilo. 1951. 400 paĝoj 12×18 cm. — Temas pri ampleksa romano rakontata per simpla lingvaĵo, kiu plaĉas al multaj. Ĝi rolas en Romo kaj en Palestino. Historio pri centestro en Kapernaŭm el evangelio estas la kerno, el kiu disvolvigis la romano. Legi ĝin interesos multajn esperantistojn. Ĝi bazas sur firma kredo je Kristo, filo de Dio, Savinto de la mondo.

Sed kio faras la libron interesa aparte, estas aserto, ke ĝia verkinto estas nura skribinto de la rakonto, kiun revelaciis al li mediume la ĉefa rolinto de la romano, Roma senatano Publio Lentulus helpe de spirito (en spiritisma senco de la vorto) nomata Emmanuel. La aŭtoro, kiu ricevis klerigon sole en elementa lernejo, publikigis tiamaniere jam ĉirkaŭ 40 verkojn pri tre diversaj temoj.

Do estos interese legi tiun libron ankaŭ tial. Sed la lego tiun aserton ne kredigas. Emmanuel asertas, ke la senatano Publio Lentulus vivis antaŭ ĉ. cent jaroj kiel unu el konspirintoj de Katilina. Lia vivo dum tiu enkorpiĝo estis vivo aĉa morale. Lia animo estas devigata sin purigi per vivoj en aliaj enkorpiĝoj. Do ni rajtas atendi, ke Publio Lentulus memoranta sian vivon kiel kunulo de Katilina povos diri al ni iajn detalojn pri tiamaj problemoj: Sed li scias diri nenion novan. Li pentras la tiaman situacion komplete laŭ vidmanieroj, kiujn instruis al gimnazianoj kaj univer-

sitatoj instruistoj kaj profesoroj de la historio kaj de la latina lingvo antaŭ ĉ. cent jaroj. Katilina estis fiulo kondamninda kaj Cicero genia oratoro, akrevida politikisto kaj savinto de la Roma respubliko. Sed intertempe esploro historia kaj filologia ŝanĝis takson de moralaj kaj intelektaj valoroj de tiamaj ĉefroluloj. Katilina aperas kiel unu el protagonistoj de sociala renverso, Cicero kiel reakciulo, kiu klopodis konservi la malnovajn sistemojn kaj la malnovajn vidmanierojn. Cicero estis bona oratoro kaj filozofia verkisto eklektisma. Sed politike li estis naivulo, persone troa ŝparulo. Li estis murdita de partianoj de la imperiestro, kiu akiris la potencon kiel popola tribunuso kaj promesanta rajtojn politikajn kaj ekonomiajn al proletaro roma. Kial Publio Lentulus nenion scias diri pri tiamaj luktoj ideaj? Ĝi estus rakonto tre aktuala nun dum la batalo pri transformiĝo de sociaj sistemoj.

Sed ankaŭ pri Kristo kaj historio de tiamaj tagoj ne scias Lentulus diri al ni ion novan, ion kio ne estus trovebla en la evangelioj kaj en la historiaj lernolibroj popularaj. Krome: tiuj romaj civitanoj kaj tiu popolo palestina parolas tro moderne, laŭ nunaj esprimkaj pensmanieroj de meze kleraj homoj.

Tion ni diras ne por malaltigi la valoron de la libro. La romano valoras la legadon, estu ĝia deveno kutima laŭ niaj spertoj pri verkado, aŭ estu ĝi verkita mediume.

Ankaŭ la traduko meritas laŭdon. Ĝi ne estis laboro facila. Rezultis el ĝi libro agrable legebla, kiu redonas la originalan tekston tre adekvate. Ankaŭ la tipografia aranĝo de la libro estas tre plaĉa. Ni danku al la eldoninta Federacio kaj al ĉiuj, kiuj kunlaboris pri tiu ĉi libro impona.

Arbaron oni hakas.

G. A. Gálina

Arbaron oni hakas... Junan, verdan, belan...
Maljunaj pinoj staras do kun vid' severa,
kaj tute plenaj de malgaja pens' mistera
rigardas al la malproksima lum' ĉiela.

Arbaron oni hakas... Ĉar ĝi sonis brue,
ĉar ĝi per ĝoja bruo vekis tutan teron,
ĉar kantis ĝia juna foliar' tro frue
al suno klara la feliĉon kaj liberon.

Arbaron oni hakas... sed ni semojn ŝparos,
ilin la tero aperigos per vivforto
kaj verda mur' de batalantoj ree staros
kun nova bruo sur la lok' de l' frata morto.

El la rusa trad. Vs. Lojko

Fino de la artikolo sur p. 135.

Estas kompreneble, ke uzado de Esperanto kreis inter ĉeĥoj ankaŭ majstrojn de la lingvo. Protagonisto inter poetoj estis Stanislav Schulhof. Sekvis Miloš Lukáš majstro en versotradukoj, Rudolf Hromada, kiu vidigas nekutiman sentokapablon por ritmo kaj koloro de versa lingvaĵo, Tomáš Pumpr, profunde enpenetranta en esenco de verso tradukota kaj uzanta por ĝia redono subtilaĵojn gramatikajn kaj vortofarajn, Karolo Pič verkanta originalajn poemojn jen pentrantajn belajojn el morta kaj vivanta naturo, jen amajn spertojn aŭ sopirojn, Jiří Kofínek sukcese provanta redoni komplikaĵajn versoformojn de modernaj poetoj, kaj aliaj.

Plej frapanta pruvo pri majstreco en lingvouzo estas nunaj klopodoj, ke tekstoj de kantoj popularaj, laŭmodaj, samtempaj, oper-ariaj respondu egale al ritmo kaj al asociaĵoj de la originalo. Precipe Pumpr, Kofínek, Hromada akiris en tiu ĉi sfero rezultojn rimarkindajn.

S. K.

D-ro Felikso Zamenhof, frato de la Majstro:

Kelkaj rememoroj pri miaj gepatroj kaj Ludoviko.

Miaj gepatroj estis neordinara paro. Ĉiu el ili aparte estis alia tipo, sed ambaŭ kune ili plej bone kompletigadis. Mia patrino estis anĝelo en la plej bona senco de tiu ĉi vorto. Modesta, bonkora, ĉiam mallakta, ŝi tuktore oferis sin al la mastrumado kaj al karaj infanoj.

Absoluta ŝia kredo je la saĝo kaj justeco de sia edzo estis neniel ŝancelebla. Kiam ekz. la patro intencis puni iun el ni, la patrino ĉiam penadis bagateligi la kulpon kaj moligi la justan koleron de sia edzo. Ne prosperinte tamen, ŝi atendis en najbara ĉambro la revenon de „pekulo“ el kabineto, kie nia patro tralegis al ni „Pater-nostron“. La infano revenante el ja „juĝejo“ preskaŭ ĉiam renkontadis survoje kvazaŭ hazarde aperintan patrinon, kiu kun larmino en okulo, glatante lian pekulan kapeton, „severe“ admonadis la petolemulon.

Mi povas plej certe diri, ke la „kispuno“ de la patrino pli multe efikis ol severa admono de la patro. Kiam iu el ni laŭ ordono de la patro restis pune sen tagmanĝo (eĉ pro troa apetito, kiun ekzemple, ni malguste montris antaŭ la tagmanĝo), iu anĝelzorganto sendadis al ni pere de maljuna kuiristino Mario nian porcion (kompreneble dum posttagmeza dormeto de la patro, kaj ĉiam „nur hodiaŭ la lastan fojon“). Ni bone konis la „Nurhodiaŭon“.

Malgraŭ sia severeco la patro posedis nian plenan respekton, kaj poste, ĝis la lasta lia vivmomento, nian plej sinceran aprobon kaj amon.

Ludoviko estis favorato de la gepatroj. Mi supozas, ke li neniam kaj neniel estis riproĉata de ili. Se li nur havus ĝustan apetiton, li ricevadus duoblan tagmanĝon. Kion mi ofte aŭdadis, Ludoviko estis ĉiam malforta, pala kaj tre impresema knabo. Li estis tre ordema kaj obeema.

Tre karakteriza estas por li la respondo, kiun li, ape-naŭ kelkjaru knabo, donis al la patro en Bjalistoko.

— Ĉu vi volas iri en lernejon? — demandis la patro.

— Ĉu mi iras ĉien, kiel mi volas? respondis Ludoviko.

De mia frua infaneco mi tamen memoras lin, kiel gajan maturaĝulon, bonegan aranĝistojn de diversaj amuzoj, ekskursoj, dancoj k. t. p. Kvazaŭ nune mi memoras unu fakton. Ni ĉiuj pretigadis nin al la dormo, nia patro preparis por la morgaŭo sian instruistan paperujon, la horloĝo batis la dekan — kiam subite oni eksonorigis ĉe la enirpordo: enkuris aro da kuzoj, kuzinoj, onklinoj, pli aĝaj pensionanoj (nia patro havis pensionon por pli malpli 20 knaboj) sub gvido de Ludoviko (li loĝis malsupre en aparta ĉambreto sur teretaĝo) kaj mi baldaŭ ekaŭdis muzikon kaj dancojn. Kaj mia patro, malgraŭ sia akurateco, malgraŭ la frua morgaŭa eliro en gimnazion — eĉ unu vorton ne diris kontraŭ la fantazio de sia Ludoviko... Nur se anstataŭ Ludoviko estus mi.

Mi memoros unu kuriozan scenon tuj post mia eniro en la I-an klason de l'II-a gimnazio, kie Ludoviko tiam estis en la oka. Petolemulo, mi enkuris en la instruistan kabineton kun ĉapelo sur la kapo. Oni min tuj senĉapeligis, forpreninte la profanigilon de l'sanktejo. Plorante mi forkuris al Ludoviko. Li kunprenis min kaj prezentis al la inspektoro sian etan fraton, novebakitan unuaklasulon. Sinjoro inspektoro ekridetis kaj, redonante al mi la ĉapon, diris:

— Memoru, knabo, ĉiam imiti vian fraton, kiu estas la ornamo de nia gimnazio!

Sur revoĝo mi timeme demandis la „ornamon“, ĉu mi hodiaŭ restos sen tagmanĝo?

— Ne, vi certe ricevos ĝin, ĉar neniu ja scios pri la ĉapepizodo.

Ludoviko estis fervora piedirulo. Li ofte iris sola aŭ aranĝadis opan piediron al Vilanov (antikva pola reĝa rezidejo proksime de Varsovio), aŭ la ĝeneralan ekskurson en omnibuso speciale dungita por la tuta familio kaj pensiono. Mi tre klare memoras unu dolorigan epizodon dum tia ekskurso; mi dufoje falis de sur la veturigista duto, kien min por mia granda ĝojo ekkomandis Ludoviko.

La patro riproĉetis lin pro la tro bonkoraj „fantazioj“ kaj efektive Ludoviko estis por mi kvazaŭ enpersoniĝo de ĉio bona kaj saĝa. Nian bonkoran malsaneman patrinon li preskaŭ diadoris. Kaj reciproke — Ludoviko estis por ŝi kvazaŭ okulpupilo.

Post la frua morto de nia adorata patrino, la 1. XI. 1892, ni ĉiuj restis en profundega korfunebro. Depost ŝia morto, kiu sendube lasis sur la sentema animo de Ludoviko profundan postsignon, nia patro alproksimiĝis al siaj infanoj, kaj liaj interrilatoj kun ni fariĝis pli amikaj, malpli oficialaj kaj „pedagogiaj“.

Feliĉe la neston de nia patro ne trafis la sorto de multaj aliaj familiaj nestoj.

Kiom ofte anoj kaj aninoj ĝiaj, eksentinte la flugkapablon, forflugas en la mondon por foriĝi kaj ne reveni plu en sian patrinan neston — ĉe ni okazis alie: ĉiu laŭvice ekfluginta birdeto revenis kun sia ino en la gepatran neston kaj pro grandega ĝojo de nia patro ni ĉiuj ekloĝis en Varsovio. Baldaŭ la patro fariĝis „pensiulo“ (emerito), sen ia difinita laboro kaj vivo aranĝiĝis por ĉiam en neniel ŝancelebla rondfamilia unueco.

Kaj ekstarigis tiam niaj sabataj familiaj kunvenoj ĉe la patro, kiu fierante ofte diradis:

— Riĉulo mi neniam estis, sed jen mia riĉeco kaj fiero de mia vivo.

La sabataj kunvenoj tradicie daŭras ĝis nun kaj espereble daŭros longe poste.

Ludoviko ofte helpadis la patron, precipe kiam la lasta, fininte sian 35-jaran instruistan servon fariĝis „pensiulo“ (emerito) sen ia difinita laboro kaj vivimpulso. Ĝuste tiam la patro komencis la pligrandigon de sia kvarlingva proverbaro, kaj poste laŭ inspro kaj kunhelpo de Ludoviko — ĝian esperanto-tradukon. Ĉar la esperantista movado tiam ne estis tro matura, la „proverbaro“ ne havis perspektivon de granda vendado. Por tamen ne disrevigadi sian karan patron kaj ne senvolontigi lin por plua laboro, Ludoviko uzas senkulpan fortelon: skribas al la „Esperanto-Verlag Möller kaj Borel“ kaj jen unumatene la patro ricevas oficialan mendon de tiu ĉi firmo: Plej baldaŭ sendi „kelkcenton da esperanta proverbaro...“

Mia patro estis superfeliĉa! Lia laboro ne estas vana!

Se vi tamen volus serĉi la fonton de ĉi tiu patra ĝojo kaj per la fadeno veni al ĝia bulo — vi nepre trafus en la ... poŝon de Ludoviko.

Ludoviko, kiom mi memoras, estis vera homarano, laŭ ĉiuj dogmoj de sia posta „homaranismo“, kiu antaŭiris la inspiron de la lingvo Esperanto. La fajro de homaranismo brulis en lia koro ĝis lia lasta vivospiro. Li ofte parolis kun mi pri ĉi tiu fajro kaj karesis la esperon, ke eble venos tamen la horo, kiam la homaro vekigis por la alia pli bona vivo.

Sed venis la milito, kiu plirapidigis lian morton.

28. VI. 1919.

Také dílo Felixe Zamenhova (1868—1933) může být zařazováno do literatury před první válkou i po ní.